**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **SEPTEMBRO-OKTOBRO 1999**

MEL eldonis la 5-an eldonon de "Adresaro de Esperantaj Grupoj". Oni sendas po 70 ESP (poŝtmarkoj)

**FIGHIERA TRANSDONAS ELDONRAJTON AL HEF**
La franca kaj hispana lernolibroj reeldonotaj. La du jam tre famaj nacilingvaj Esperanto-lernolibroj -respektive "Nouveau Cours d'Espéranto" (en la franca) de R. Triolle kaj.E. Ludwig; kaj "Nuevo Método de Esperanto" (en la hispana) de F. De Diego estos baldaŭ reeldonitaj fare de Unuiĝo Esperantista Franca (UEF) kaj Hispana Esperanto-Federacio (HEF). Ambaŭ lernolibroj jam konis du eldonojn zorge de la senprofitcela asocio "Heroldo de Esperanto"-Torino, kiu aperigis la samnoman gazeton dum 36 jaroj sub la redaktado de Ada Fighiera-Sikorska. La dirita asocio ĵus donacis siajn eldon-rajtojn al la du Landaj Asocioj.

**EKSTERLANDE**
La Papo Juan Pablo II ricevis, dum sia vizito al Pollando, medalon de la toleremo kiu donis Fondaĵo Zamenhof de Bialistok. Estisla nepo de la kreinto de Esperanto kiu transdonis al Papo la medalon dum la ekumena ceremonio en Drohiczyn. Pola televido elsendis ĝin kaj oni povis vidi al D-ro Zaleski-Zamenhof parolante kun la Papo.
Dum Augusto Lupe Sanz feriis en Islando kie vizitis la Esperanto-grupo akompanata de Kristján Eiriksson, rekaktoro de la revuo "La tradukisto".

**ENORMA TRIUMFO DE IBERIAJ AŬTOROJ**
En la Belarta Konkurso de UEA 1999 estis plurfoje premiitaj la jenaj Esperanto-verkistoj: Poezio:1-a premio: Antonio Valén (Hispanio) pro "Amafer' iama" 3-a premio: Gonçalo Neves (Portugalio) pro "Amoroj" Honoraj mencioj: Gonçalo Neves (Portugalio) pro "Gagat'" kaj "Aglo". Prozo: Honora mencio: Jorge Camacho (Hispanio) pro "Ludwig". Eseo: Premio "Luigi Minnaja": Gonçalo Neves (Portugalio) pro "Niaj verboj sen veproj" . Koran gratulon al Valén, Neves kaj Camacho!

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**
6-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo. 2-9a de oktobro. Cambrils Tarragona). Organizas Hispana-Esperanto Muzeo.
Kun la ĉeesto de kelkaj madridanoj ,en Julio okazis en Castellón la **58-a Hispana Kongreso de Esperanto,** skize ni rezumas la eventon al kiu partoprenis malpli ol cent partoprenantoj kiuj ne ricevis kongreslibron. Elstara estis la Kongresejo, en la tute novaj ejoj de Universitato Jaume I. Nur ia malkonveno: la granda distanco inter la urbocentro kaj la Universitato, kaj la nefunkciado de aŭtobusoj dum la semajnfino, kio devigis la kongresanojn longege piediri aŭ uzi taksion. Kelkfoje eĉ oni devis peti helpon al la multnombra pola partoprenantaro, kiu bonvole oferis al ni siajn aŭtobusojn por transporti nin al la plaĝo, kie okazis la giganta "Paella". Kvankam ĉi punkto de la programo evidente estis nur folkloraĵo, ĝi atingis enorman sukceson: ĉiuj kongresanoj povis manĝi "paeljon" kaj trinki "sangrion" ĝis kompleta sato, en la tre agrabla etoso de la apudmara pinarba parko. Rimarkinde estas ke la grandmagazeno "Alcampo", aŭspiciis per donaco de la ingrediencoj. Inter la prelegoj, mi plej ŝatis tiun de David Galadí, profesoro pri astronomio en la Barcelona Universitato, kun interesega fina diskuto pri la "nigraj truoj" kaj pri la stranga teorio pri la spacaj "vermoj", kiuj, evidente, ne estas bestetoj, sed interspacaj vojoj tra kiuj (ĉiam teorie) oni povus rapidege vojaĝi tra la Kosmo. Vigle partoprenis en la diskuto nia kara Miguel Gutiérrez Adúriz, kiel aŭtoro de sciencfikciaj rakontoj. Galadi klarigis ke la nigraj truoj estas nur normalaj astroj, sed kun tiel granda maso kaj gravito ke ili ne ebligas la eliron eĉ de lumradioj, tial ili estas nevideblaj. Solotronik regalis nin per unu el siaj sukcesaj prezentadoj pri elektronika muziko. Ankaŭ li prezentis sian novan kompaktan diskon "Polimorfia Arkiteknia". Ankaŭ sukcesaj estis la teatraj vesperoj de Bulgara Esperanto-Teatro. Kvankam la prelego de M.A.Sancho pri Interreto ne okazis, anstataŭe oni prezentis tre interesan projekton de E-kurso sur CD-Rom, nun en preparo far samideanoj el regiono Murcio. Plej elstara punkto de la

programo estis la oficiala inaŭguro de Placo Esperanto en moderna kvartalo de Castellón, kun ĉeesto de municipaj aŭtoritatoj, televido, radio kaj gazetaraj ĵurnalistoj. *(Informas Darío)*

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

| **NIA VOĈO** | **SEPTEMBRO-OKTOBRO 1999** | 1999 |
|---|---|---|

La **84-a UK** okazis en Berlino (Germanio) komence de Aŭgusto. Partoprenis 2.712 esperantistoj, inter ili la madridanoj, Manolo Pancorbo, Angelita Sanz kaj David Trigo. En la solena malfermo estis legataj du gravaj mesaĝoj: de Kofi Annan, Ĝenerala Sekretario de UnuiĝintajNacioj, kaj de Federico Mayor Zaragoza, Ĝenerala Direktoro de UNESKO. La programo estis abunda kaj varia por esperastistoj kaj akompanantoj. Rafaela Urueña prelegis pri la temo "De la homarana helpo al la homarana interveno en la aktuala internacia juro", en la Internacia Kongresa Universitato kiun rektoris la nobelpremiito R. Selten.

**55-a Internacia Junulara Kongreso** okazis en Hungario kun la ĉeesto de la madridado David Trigo.

**HEF ANGULO**

**Ĝenerala Asembleo:** La prezentado de la kontoj al la oficialaj instancoj en junio devigas programi ĝiajn aprobojn antaŭe, pro tio la Generala Asembleo kaj la Hispana Kongreso devas okazi antaŭ tiu monato, prefere en la ponto-festo de majo aŭ dum Pasko. Rilate la venontajn kongresojn, oni decidis ke je la jaro 2000 la Kongreso okazos en la Madrida Regiono dum la labora "ponto" de la 1a Majo. Je la jaro 2001 ĝi okazos en San Javier (Murcia), se la aktualaj novaj municipaj aŭtoritatoj (malsamaj post la balotado), daŭre helpos tiun eventon. Miguel Angel Sancho kaj Manuel Pancorbo, prezentante la kandidatecon de Madrido por la venonta Kongreso, emfazis ke tiu Kongreso devos esti pli koncentrita, precipe pri kulturaj aranĝoj, kaj ke estus dezirinde okazigi ĉiujn aranĝojn en unu nura loko (eble en hotelo: hoteloj estas nun specialiĝintaj pri kongresoj kaj similaj aranĝoj).

**ESPERANTO EN AMAS-MEDIOJ**

**"Diari de Sabadell"** publikigis fotografaĵon pri la inaŭguro de la Placo Esperanto en Castellón kaj mallonga novaĵo pri la partopreno de membroj de la Kultura Asocio Esperantista en la Hispana Kongreso.
Dum septembro **Onda Madrid** kaj **Onda Cero** elsendis informojn pri esperanto.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.
Bazan kurson komenzos gvidata de Juan del Castillo en Oktobro (2 tagoj semajne)
18 de Oktobro je la 19,00h "Voĝajo al UK-Berlino". Komentarioj kaj fotografaĵoj de Angelita Sanz.
25 de Oktobro je la 19,00h "Kongreso de Castellón, lernataj lecionoj". Carmen Súarez

**59-a HISPANA KONGRESO-Majo 2000**

Kvamkan unua foje en la historio de la E-kongresoj grupo de esperantistoj oferis sin por prepari kongreson sen havi urbon, la madridaj esperantistoj jam komencis la laboron por prepari la kongreson de la jaro 2000. En diversaj kunvenoj oni akordis serĉi kongresejon en vilaĝo apuda al Madrido prefere kun loĝejoj proksimaj.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
**San Alejandro 6-4ºB. Ext**
**28005 Madrid**
Asociación de Utilidad Pública Municipal